

BRAZILA ESPERANTISTO

47-A JARO

NOVEMBRO-DECEMBRO 1953

N. 476-477

XIV BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO



Viadukto Carvalho

(Fervojo Curitiba-Paranaguá)

NOVEMBRO-DECEMBRO 1953

47-a Jaro

N. 476-477

BRAZILA ESPERANTISTO

(«O Esperantista Brasileiro»)

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 1.º

Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

 Senpaga por anoj de B. E. I.
 Eksterlande: unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj**QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**

(De acôrdo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

	Cr\$
Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o «Brazila Esperantisto»	40,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista «Esperantisto»	70,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista «Esperantisto»	150,00
Membro Mentenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	250,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante	1.500,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante	3.000,00

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.º****Rio de Janeiro, DF.****ESPERANTO NA IMPRENSA DO BRASIL**

Tivemos conhecimentos de publicações sobre o Esperanto, nos seguintes periódicos brasileiros:

 AMAZONAS — *O Jornal*, de Manaus. PARÁ — *O Estado do Pará, A Província do Pará, Folha do Norte*, de Belém. CEARÁ — *Águia de Haia*, de Fortaleza. RIO GRANDE DO NORTE — *Diário de Natal*, de Natal. PERNAMBUCO — *O Monitor*, de Garanhuns; *A Verdade, Diário de Pernambuco*, do Recife. ESTADO DO RIO DE JANEIRO — *O Estado* (entrevista com o Dr. Mário Ritter Nunes), de Niterói. SÃO PAULO — *Boletim do Rotary Club de Guararapes, São Paulo Leste* (boletim do Rotary Club de São Paulo Leste), *Vida Rotária*, de São Paulo; *Correio da Sorocabana*, de Presidente Prudente; *O Liberal*, de Americana; *Diário da Região, A Notícia*, de São José do Rio Preto; *Correio de* *Noticias*, de Ourinhos; *O Jornal de Mojimirim*, de Mojimirim; *O Município*, de Leme; *Folha do Povo*, de Bauru; *Sete Dias*, de Pindamonhangaba; *A Tribuna, Rotary Club de Santos* (boletim semanal), de Santos. PARANÁ — *O Colégio Estadual do Paraná*, órgão oficial dos alunos, (entrevista com o Sr. Augusto G. de Castro), de Curitiba. SANTA CATARINA — *O Comércio*, de Porto União. RIO GRANDE DO SUL — *Orientador*, de Passo Fundo. MINAS GERAIS — *Diário de Minas* (seção dominical, a cargo de M. Rodrigues de Carvalho), *Estado de Minas*, Belo Horizonte; *Diário da Tarde, Diário Mercantil*, de Juiz de Fora; *Cidade de Ubá, Ubá*. DISTRITO FEDERAL — *Sesinho*, revista infantil do Serviço Social da Indústria, com um curso dirigido por Manuel Avelaz; *Correio da Manhã, Tribuna da Imprensa, Diário de Noticias 13-9* (excelente artigo sobre o Esperanto, de Iojuara Atsok (I. Araújo Costa) sobre "Esperanto e compreensão mundial").

BRAZILA ESPERANTISTO

47-A JARO

NOVEMBRO-DECEMBRO 1953

N. 476-477

D-ro L. L. ZAMENHOF

En ĉi tiu numero de la lasta monato de la jaro, kiam oni solene memoras la 94-an naskiĝan datrevenon de nia Majstro, ni opinias interesa la re-produkton de la fina peco de la parolado de li farita en la Guildhall de Londono, la 21-an de Aŭgusto 1907:

«Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj songoj, vi, kiun nenia alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro, vi atestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas; ĉu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter ĉiuj viaj loĝantoj, kvankam mi devis bedaŭrinde forlasi vin, simile al multaj centoj da aliaj viaj filoj — aŭ ĉu tiuj personoj, kiuj deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj ĉiuj aliaj viaj filoj estu rigardataj kiel fremduloj aŭ sklavoj! Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝustevian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon alĝuiĝi per sia tuta koro al tiu peco da tero, kiu lin naskis!

Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiuj ilin ĉiujn egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo. Kaj se iam venos tiu feliĉa tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado de tiuj homoj, kiujn ni vidas nun en ĉi tiu ĉanbrego kaj kies nomo, ankoraŭ tre malmulte konata kaj tre malmulte ŝatata estas «esperantistoj».

LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

Coligidas e anotadas pelo Professor
G. Waringhien

Um documentário cuja leitura empolga como o mais fascinante romance

2 volumes encadernados — Cr\$ 200,00



Brazila Kroniko

RIO GRANDE DO NORTE

Natal — Ĉe la Liga Artística Operária (Metiista Arta Ligo) estas instalita, la 26an de Septembro, Esperanto-kurso, kiun gvidas nia samideano Arlindo Castor de Lima.

Je la 28-a de Septembro la ordinara Ĝenerala Kunsido de Associação Potiguar de Esperanto elektis sian novan estraron: Prez. D-ro Sebastião Maltez Fernandes; Ĝen.-sekr. Paulo de Góis; 1-a Sekr. Arlindo Castor de Lima; 2-a Sekr. José de Oliveira Dias; Kas. F-ino Margarida Sampaio Barros; Bibl. Fraŭlino Ivoneide de Góis Amorim; Prez. Depart. Kult. kaj Prop. Frederico Carlos Soder.

Ni ŝuldas la aliĝon al Esperanto de Leŭtenanto Soder al la revuo *Sesinho*, dank' al la E-kurso kiu en ĝi faras nia samideano M. Aveleza, kies lecionoj altiris lin. Soder estas nun fervora esperantisto.

PERNAMBUCO

Recife — Al la Ŝtata Parlamento kaj al la Urbleĝantaro de Recife oni prezentis proponojn por esti konsiderata la Associação Pernambucana de Esperanto kiel Societo de publika utilo, ŝtata kaj komunuma.

En alia numero ni donos pli precizajn informojn pri ĉi tiu afero.

Nune faras E-kursojn: Associação Pernambucana de Esperanto; Recife Esperanto-klubo; Departamento de

Documentação e Cultura; Ginásio Independência; Federação Espírita Pernambucana; Clube do Estudante Universitário; Club Náutico Capibaribe; rua Passo da Pátria 323, samideano Omarina Medeiros.

BAHIA

Vitória da Conquista — En la 24-a de Septembro nia samideano Manuel Borges dos Santos komencis gvidi Esperanto-kurson al ĉirkaŭ 40 lernantoj, sekvante la direkton donitan de la «Curso Prático de Esperanto». Ni havos do, baldaŭ, novbakitan aron da samideanoj.

STATO RIO DE JANEIRO

Niterói — Sub la aŭspicio de Niterói Esperanto-Klubo kaj kun la apogo de la Ŝtata Registaro okazos la Unua Esperanto-kunveno de Ŝtato Rio de Janeiro, la 5-6an de Novembro.

Dum ĝi, estos diskutataj problemoj koncerne la disvastigon de Esperanto en la Ŝtato.

La gazeto *O Estado* (14-X) presigis interesan intervjuon pri la baldaŭa kunveno, faritan kun D-ro Mario Ritter Nunes, prezidanto de N.E.K. kaj de la Organiza Komisiono.

MINAS GERAIS

Belo Horizonte — En la 25-a de Septembro Sociedade Mineira de Es-

peranto disdonis atestojn pri lernado al 68 gelernantoj, kiuj ĉeestis la E-kursojn ĉe la Escola Técnica de Comércio kaj Escola de Esperanto, kies gvidantoj estas resp. D-ro Carlos Rezende, prezidanto de S.M.E. kaj Manuel Rodrigues de Carvalho.

Brile parolis la protektanto de la diplomitaro, deputito Bolivar de Freitas. En nomo de ĉiuj kolegoj parolis la diplomitino Heloise Bedran. Laŭ la plano de D-ro Luís de Azeredo Coutinho, kiu destinis oferdone kvin premiojn al la gekursanoj, kiuj plej profitas la lecionojn, premiojn konsistantajn el aliĝoj al BEL kaj UEA, estis premiitaj la jenaj: F-inoj Venina de Castro, Alcyone Nunes Muniz, Heloise Bedran, S-roj Yrjo Ilmari Simola kaj Waldemar de Souza Peixoto. Ĉiuj lokaj gazetoj kaj radiostacioj raportis pri la agrabla festo.

Juiz de Fora — La urba Konsilanto S-ro Wandenkolk Moreira prezentis proponon por esti nomita «D-ro Lazaro Zamenhof» unu el la stratoj de la urbo. Ĉi tiu propono estis aprobita en kunsido de la 22-a de Oktobro.

Dum kunsido difinita por la lasta tago de Oktobro oni elektis la difinitivan estraron de Clube Esperantista de Juiz de Fora, kies nomojn poste ni donos.

Prata — Nia samideano Prof. João Rodrigues do Prado, propagandante nian lingvon, faris du paroladojn en ĉi tiu prospera urbo — unu en la salono de Cine-Prata, alia en la salono de Prata-Clube. En la Gimnazio São Luiz, kies profesoro li estas, li gvidas nun Esperanto-kurson, kiun vizitadas granda nombro da lernantoj, inter kiuj

troviĝas la plej kleraj loĝantoj en la urbo.

Ubá — Per iniciato de kelkaj instruistoj en la Ŝtata Kolegio «Raul Soares» okazis, en la 16-a de Septembro, ĉe la Komerca Asocio de Ubá, esperantista kunveno. Pluraj oratoroj parolis pri diversaj aspektoj de la afero. Horo de lernantinoj de la kolegio kantis la himnon La Espero.

SÃO PAULO

Nia agema entuziasma samideano Francisco Souza Almeida daŭrigas inteligentan propagandon de nia lingvo, profitante sian profesionan vizitadon al diversaj urboj. Li sinsekve faris paroladojn pri Esperantaj temoj, en São José do Rio Preto (ĉe la Sociedade de Medicina), en Bauru (ĉe salono de la Associação Comercial), en Presidente Prudente (ĉe la redakcio de *Correio da Sorocabana*), kaj invitita de Rotary Club, ĉe la tesalono Ambassadeur. Ĉiuj paroladoj havis altklasan ĉeestantaron, kiu varme aplaudis la oratoron. Ni deziras ke la semoj plantitaj produktu bonan rikolton.

Dum la kunveno de Rotary Club de São Paulo en la 24-a tago de Septembro, nia sindona amiko Alcindo Brito paroladis pri la celoj de Esperanto, kiu vere entenas la altajn idealojn de Rotary. Lia parolado estas publikigita en la Septembra numero de São Paulo Leste, bulteno de Rotary Club de São Paulo Leste.

Avaré — Nia samideano João Batista de Andrade propagandas nian lingvon kaj sciigas nin pri baldaŭa fondo de grupo en ĉi tiu urbo.



O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO



ALEMANHA — Os horários dos trens das Estradas de Ferro Alemãs, que tinham traduções apenas em linguas francesa e inglesa, vêm também agora em Esperanto.

— A Sra. Kreisher, esperantista residente em Colónia, perdera um filho na última guerra, e desejando conhecer onde foi ele sepultado, escreveu ao samideano A. Zovalti, na Itália. Este, após dois meses de pesquisas, conseguiu obter a informação precisa, comunicando à mãe que seu filho Wilhelm, morto durante um bombardeamento aéreo, no dia 20-3-1945, fôra sepultado em Udine, dando o lugar exato no cemitério.

AUSTRIA — “*Esperanto*” vencedor! No 85.º Concurso de corridas realizado em Freudenu, no dia 8 de Junho, com uma assistência de 18.000 pessoas, ganhou o primeiro premio o cavalo *Esperanto*, de propriedade do Sr. Saxhofer. (*La Spiegulo*, Junho 1953).

ESPAÑA — Fundou-se o *Esperantista Grupo de Madrid*, há muito tempo desejado e planejado pelos *samideanoj* madri- lenos.

FRANÇA — Existem na França 19 ruas que têm o nome do Dr. L. Zamenhof. Estão situadas em Amiens, Arras, Bisheim, Boulogne-sur-Mer, Cagnes-sur-Mer, Cannes, Clamort, Issy-les-Moulineaux, Houilles, Malakoff, Montbéliard, Mulhouse, St. Raphaël, Sotteville-les-Rouen, Vauves, Villeneuve-St-Georges, Viroflay, Perpignan, Romans-sur-Isère.

Em três departamentos da Alsácia — Lorena é oficial o ensino do Esperanto nas escolas primárias, resultado que se deve ao nosso samideano de SAT, H. Ferez.

JAPÃO — O Clube Esperantista da Faculdade de Medicina da Universidade de Tohoku, Sendai, arranhou uma exposição esperantista por ocasião da Festa Médica da Faculdade (29-31 Maio).

Durante o 3.º Congresso de Tokai Esperanto-Ligo em Yoro, os esperantistas fizeram esplêndida excursão à cascata Yoro, bem conhecida pela lenda do filho fiel.

SUIÇA — O Dr. Arthur Baur, pela Sociedade Suíça de Radiodifusão, de Berne, comunicou-nos que recebeu esta Estação 30 cartas de pessoas que ouviram perfeitamente e apreciaram a saudação ao Brasil, irradiada em Esperanto, sendo 18 cartas provenientes de nosso país. A Radio Suíça respondeu pessoalmente a todos os missivistas, e pediu-nos também que tornássemos público seu contentamento pelo facto, e seu agradecimento aos *samideanoj* brasileiros.

NEKROLOGO

Manuel Barbosa Mello

La 9-an de Aŭgusto forpasis nia samideano Manuel Barbosa Mello. Li naskiĝis en la ŝtato Sergipe, kaj jam de multaj jaroj laboris kiel bankoficisto.

Barbosa Mello estis sindona esperantisto, kaj gvidis kompetente Esperanto-kursojn en ĉi tiu ĉefurbo, kie li mortis.

ADRESARO DE ESPERANTISTOJ

D-ro L.L. Zamenhof «transiris Rubikonon», kiam en Julio de la jaro 1887 li publikigis sub la pseŭdonimo «Dr. Esperanto» sian unuan libron en la rusa lingvo: *Mjejdunarodnij Jazik. Predislovje i polnij učebnik* (Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro) Por rusoj. Varsovio, 1887, 40p. + 1 folio.

Unu monaton post ĝi, aperis la pola eldono: *Jezyk Miedzynarodowy. Przdmowai podrecznik Kompletny*. Por poloj. 1887, 40 paĝoj + 1 folio.

Du monatojn post la pola eldono aperis la franca unua libro, sur kies unua paĝo oni legas: Dr. Esperanto — *Langue internationale*.

Préface et Manuel Complet. Por Francoj. *Pour qu' une langue soit universelle, il ne suffit pas de lui en donner le nom. Prix 50 cent. Varsovie. En vente chez Gebethner et Wolf* — 1887, 48 p. + 1 folio.

Unu monaton post la franca eldono aperis la germana verko: *Internationale Sprache. Vorrede und vollständiges Lehrbuch* — Por germanoj. 1887, 48 paĝoj + 1 folio.

Fine aperis la angla eldono de la unua libro: *International Tongue. Preface and complete Method edited for Englishmen by J. St.* Por angloj. Varsovio, 1888, 39 p. + 1 folio. Poste, en 1889, aperis nova traduko de la unua libro, farita de R. H. Geoghegan: *Dr. Esperanto's International language. Introduction and complete Grammar* 40 p. + 1 folio. Al ĉiu eldono rusa, pola, franca, germana, an-

gla, estis almetitaj kvar folioj kun 16 promesoj, jene: «Promes'o — Mi, sub' skrib' it'a, promes'as el' lern'i la propon' it' a'n de d-r'o Esperanto lingv'on internaci' a'n, se est' os montr' it'a, ke dek milion' o'j person' o'j don'is publik'e tia'n sam' a'n promes' o'n. Sub' skrib'o — Nom'o — Adres'o».

Kiam D-ro Zamenhof ricevis la deklarojn de mil personoj, kiuj lernis la proponitan lingvon, kaj tiel aliĝis kiel esperantistoj, li presigis la unuan adresaron: «*Adresaro de la personoj kiuj ellernis la lingvon «Esperanto»* — Serio I — (N.º N.º 1 ĝis 1.000) — *Spisok lic, izučivših jazik «Esperanto»*. Sjerija I (N.º N.º 1 do 1.000). El rusa lingvo — Varsovio. L. Zamenhof, str. Przejard n-ro 9. Presejo de Ĥ. Kelter, Varsovio, strato Novolipie n-ro 11. 1.889. 1 vol. 39 paĝoj. Ĉi tiu verko estis la n-ro 31. en la Nomaro de la Verkoj pri la lingvo Esperanto.

La Adresaro entenas, laŭ alfabeto ordo de la familia nomo, la nomon kaj adreson de la unuaj mil esperantistoj. Kiel estas nature, la plimulto estas de rusoj (inkluzivitaj la poloj, estonoj, litovoj, latvoj, finnoj): 921. La restantaj 79 estas: 29 germanoj, 21 aŭstro-hungaroj, 9 britoj, 6 francoj, 4 svedoj, 4 usonanoj, 2 turkoj, 1 italo, 1 hispano, 1 rumano, kaj 1 el Ĉinujo.

Inter ĉi tiu milo da pioniroj oni povas mencii neforgeseblajn nomojn de aŭtoroj de Esperantaj verkoj, originalaj aŭ tradukitaj; de aliaj kiuj, en nia unua gazeto — *La Esperantisto* (1889-1895) kunlaboris, kaj kies verkaĵoj konsistigas parton de la klasika *Fundamenta Krestomatio*; kaj de fervoraj propagandistoj de la lingvo.

La n-ro 46 en la alfabeto nomaro apartenas al S-ro L, de Beaufront: «de Beaufront, Louis, instruisto, Rumont, par la Chapelle-la-Reine, S.-et-Marne, Francujo».

Aliaj nomoj:

- N-ro 30 — Fedor D. Avilov, Rusujo.
 N-ro 82 — Leopold Blumental, pola advokato, verkisto, konata sub la pseŭdonimo Leo Belmont, Varsovio.
 N-ro 178 — A. Demonget, Paris, Francujo. (Internacia ou Volapük?).
 N-ro 186 — Aleksandr Dombrowski, katolika pastro, Rusujo, aŭtoro de «Nova Kanto» kaj aliaj poezioj en Fundamenta Krestomatio. (Lernolibro por Litovoj).
 N-ro 205 — Leopold Einstein, ĵurnalist, Nürnberg, Germanujo. (Volapük und Lingvo Internacia).
 N-ro 241 — Marietta Frollo, Bukarest, Rumanujo. (Vortareto Esperanto-Rumana).
 N-ro 264 — Richard H. Geoghegan — Anglujo. Stenografiisto; de 1.900 loĝis en Usono, ĝis lia morto en 1943.
 N-ro 296 — Antoni Grabowski, inĝeniero, teknika direktoro de la fabriko p.t.: Derbenev — Dmitrovka. Ivanovo-Voznesenk, gub. Vladimir — Rusujo. Inter li kaj Zamenhof okazis la unua konversacio en Esperanto, en 1888.
 N-ro 331 — E.K. Haller, Studento de matematiko, Rusujo.
 N-ro 340 — G. Henriclundquist, Svedujo (Vortaro Esperanto-Sveda; lernolibro por Svedoj).
 N-ro 356 — Cornelius Hübert, Rusujo.
 N-ro 376 — Jan Janovski, Varsovio.
 N-ro 414 — F. de Kanaloŝy — Lefler, Rusujo.
 N-ro 513 — Nahum Kuŝnir, Rusujo.
 N-ro 548 — Rudolf Libeck, Rusujo (Lernolibro por Latvoj).
 N-ro 569 — Ivan M. Lojko, Rusujo — (Elektitaj fabloj de Ezopo kaj aliaj verkaĵoj).
 N-ro 579 — V.V. de Majnov, Rusujo (Trad. «Renaskita Manfred», dramo de K.R. (Princo Konstantin Romanov)).
 N-ro 589 — Daniele Marignoni, doktoro en medicino, Italujo (Lernolibro por Italoj).
 N-ro 590 — A.V. Martakov, Rusujo.
 N-ro 640 — Christian Nielsen, Germanujo — (Lernolibro por Danoj).
 N-ro 684 — Henry Phillips, Jr. Sekretario de la Amerika Filozofa Societo — Philadelphia. (American Philosophical Society), Usono.
 N-ro 755 — Grig. Rjabinin, Rusujo.
 N-ro 801 — Christian Schmidt, Nürnberg, Germanujo (Prezidanto de la plej grava societo de volapükistoj, en Decembro 1888 forlasis Volapükon. Kun Z. eldonis la unuan E-gazeton *La Esperantisto*).
 N-ro 918 — W.H. Trompeter, termezuristo en Schalke, Germanujo. «Kiam en 1.891 Z. perdis ĉian esperon daŭrigi eldonadon de la sola E-gazeto *La Esperantisto* pro manko de monrimedoj, Trompeter prenis sur sin ĉiujn elspezojn de la gazeto por tri jaroj (1892-94), oferis monate 100 markojn por la redaktoro. Per lia helpo ankaŭ aperis kelkaj gravaj libroj. Li verkis, kune kun Chr. Schmidt, lernolibron» (Enciklopedio de E.).

N-ro 932 — E. de Wahl, Rusujo («Kunfondinto de la unua E-societo en Rusujo. Verkis vortareton por hispanoj, en 1889. Trad. Princino Mary», rakonto de Ler-montov. Post la voĉdonado pri la ŝanĝoj en E, 1894, li forlasis la E-movadon kaj publikigis en 1922 la lingvon Occidental kaj la revuon Kosmoglott» (Enciklopedio de E.).

A. Caetano Coutinho

PENSOJ DE BIOLOGO

J. ROSTAND

La psikanalizo instruis al ni, ke la homo estas lupro ne nur por la proksimumo, sed por si mem.

Iam oni bezonus iom pli ol oni meritas.

La milito: milionoj da kadavroj per konsistigi tion, kio estas la plej malloga. — la historio.

La grandaj spiritoj ĉiam servas la veron, eĉ kiam ili kontraŭbatalas ĝin.

La sola fiero, kiun pretendu la homo: esti la plej komplika kunmetaĵo de molekuloj.

(El *Pensées d'un Biologiste*)

Esperantigis — *Hedero*

(*Flandra Esperantisto*, Aŭgusto 1952)

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

Eis a tradução do trecho publicado no nosso número passado:

LA VIVO

Graça Aranha

La vivo de homo sur la tero similas la vivon de tiuj kreskaĵoj sur ŝtono. La supro de la monto estis sennaska ŝtona plato, kie ne fruktis la semoj de la arboj kaj de la grandaj plantoj, alportataj de la birdoj kaj ventoj. Sed iun tagon ventoj kaj birdoj alportis semojn de algoj kaj primitivaj kreskaĵoj, por kiuj la tera mineralo estas taŭga nutraĵo. Post longa tempo, kiam tien denove alportitaj, tiuj antaŭe neakceptitaj semoj jam trovis la algan grundon kaj tie ekĝermis; tiam ili disverŝis ombron sur la teron, kaj tiel ŝirmis la iamajn loĝantojn, kiuj nun kuraĝe diskreskis kaj interplektiĝis sur la trunkoj de la arboj, ĉirkaŭ la korpo de siaj idoj. De la granda amo, de la senfina kaj intima solidareco formiĝis tio, kion ni admiras: tropika ĝardeno, disvolviĝanta per lumo, per koloroj, per aromoj, sur la supro de la iam nuda monto, kiun ĝi nun ornamas kvazaŭ ia krono de triumfo...

Tia sama estu la homa vivo. La homoj estas ja inter si ne egalaj, sed por veni al unueco ĉiu devas oferi iom da amo.



LA MISTERO

ROMANO

Afrânio Peixoto, Coelho Neto, Medeiros e Albuquerque, Viriato Correia

V

Frenezulo

Ĉiuj ĉeestantoj, impresitaj ne tiom de la brua plorado de la maljuna servisto sed precipe de la timego montrita sur lia vizaĝo, restis senmovaj, kaj nur la kuracisto mem vekis ilin, dirante trankvile al la maljunulo, kiu tremis sur la kruroj, kun elorbigitaj okuloj kaj palegaj lipoj.

— Ke oni arestu min... Ĉu vi volas! Ne estu ia dubo. Mi lasas min aresti. Tamen ni ĵuras al vi, Bonifaco, ke hodiaŭ vi devos malimplikiĝi kun Karlomagno kaj la dek du nobeloj de Francujo.

La maljunulo elpaŝis malfermegis la buŝon kaj kriante etendis la brakojn; per siaj kuntiritaj manoj li intencis kapti la kuraciston kaj estus kaptinta lin, se du policistoj ne penus lin teni, ĉar neatendita forto en korpo tiel malfortigita de la jaroj igis lin danĝera.

Li baraktis, blekante, saŭmante, grumblante frazojn, en kiuj aperis nomoj de reĝoj kaj sanktuloj kaj foje maldecaj esprimoj.

La delegito antaŭeniris kun severa sintenado kaj basigante la voĉon diris, ordone:

— Kvietiĝu! Kondutu konvene, alie mi metigos vin en frenezjakon.

— Mi... En frenezjakon! En frenezjakon!... Min, seriozan viron sesdek-dujaran? Vi?! Ĉu vi scias, al kiu vi parolas?!

Kaj subite li liberigis sin kaj sin ĵetis sur la delegiton.

— Ĉu vi scias! Vi parolas al la leŭtenanto Bonifáco Paiva Gomides. Mi estas de la Nacia Gvardio ĉi tie malsupre, kaj supre mi estas honorata kiel princo, ĉar... Kaj turnante sin al la kuracisto, li diris sarkasme, grincante per la dentoj:

— Diru al li, kiu mi estas, murdinto! Diru! Vi bone scias, kiu mi estas... Frenezjako... Sur min, Nu, murdinto, parolu!

Kaj la kuracisto, penante reteni la ridon, diris al la delegito:

— Mi prezentas al vi Aleksandro la Grandan, reĝon de Macedonio.

La komisaro, kiu ennazigis tabakon en la dekstran naztruon, kiu estis abismo tiel nigra kiel Cardiff-a mino, surprizita ĉe tiuj vortoj, enflaris tiamaniere, ke la tabako pro la subiteco de la flarado trairis tra la nazon kaj sin lokis en lia gorĝo, okazigante tuson tiel sufokan, ke li preskaŭ asfiksiĝis.

Estis necese, ke oni helpas lin pugnobatante al li sur la ŝultrojn por ke la tuta ŝarĝo, kiu plenigis lian ezofagon kaj ĉirkaŭojn, kaj sufokis lin, estu sputata pere de bruaj ternadoj kaj vulkanaj ekskuoj.

Liaj okuloj verŝis abundajn larmojn, kaj apopleksia koloro montriĝis sur lia malbela vizaĝo. Oni sidigis lin, kaj la kuracisto kuraĝigis lin per amikaj vortoj kaj konsiloj:

— Diable! Forlasu tiun malbonan kutimon flari tabakon! Se vi estus maljunulo, sed viro kiel vi... Kaj ne la unua fojo, vi obstrukcas vin per tiu malpuraĵo. En la Urba Teatro mem, dum la ludado de Moseo, pro la tabako vi estis en danĝero de morto.

La reprezentanto de la aŭtoritato turnis siajn malviglajn okulojn plenajn je larmoj kaj diris per flustra voĉo:

— Vi pravas. Sed mi ne povas vivi sen ia malvirteto. Oni ne konsentis, ke mi trinku bieron, mi eĉ ne preterpasas la "Brahma-n", (1), kiel vi scias, ĉar la trinkaĵo ruinigis mian stomakon. Oni malpermesis al mi la cigaredon, ĉar mi estis mortanta pro la nikotino. Mi min turnis al la kokaino kaj preskaŭ frenezigiĝis. La flartabako estis mia lasta rifuĝo kaj jen estas... Vi pravas. Sed la kulpulo estis vi, aŭ pli bone tiu malbenata maljunulo.

Kaj starante, ekscitita, kun la nazo gutiganta, li kriegis al la policistoj, kiuj tenis la demonposedatan serviston.

— Metu tiun azenon en la arestejon, kaj, se li rezistos, agu, kaj faris signon pri bastonfrapado.

(1) Biervendejo en Rio de Janeiro.

La maljunulo ekstarigis kaj denove furioziĝante estis ĵetonta sin sur la delegiton, sed unu el la policistoj ekprenis sian revolveron kaj celis lian vizaĝon dirante kun aŭtoritata tono, kiu montris, ke li estis kapabla kunigi al la minaco la agon.

— Se vi faros unu paŝon plu, aĉulo, mi pafos vin. Vi mordis mian manon kaj mi ne estas manĝaĵo por fripono. Aŭ vi kvietigis, aŭ vi ricevas kuglon.

La policisto, vera tipo de brazilanlandulo malalta kaj diktrunka, kun plata vizaĝo, larĝaj trunazoj, okuloj malgrandaj kaj longformaj, estis konsiderata kiel kuraĝegulo. Foje, dum konflikto sur la placo Lapa, li vundpafis sirianon kaj lasis ĉinon, vendiston de arakidodolĉaĵoj, en kompaktinda stato kun grandnombraj tuberoj sur la frunto. Sed la maljunulo ne sin detenis, kaj estis necese, ke la kuracisto por eviti krimon tie, antaŭ la nazo de la aŭtoritatuloj, decidus kontraŭstari la koleron de la halucinaciulo, kaj faras tion kun superstara kuraĝo, metante sin antaŭ la maljunulo kaj dirante kun ordona voĉo:

— Aleksandro, reĝo de Macedonio, tiel, vi volas trudi vian aŭtoritaton al la popoloj? Rigardu ĉirkaŭen. Kion vi vidas? Vian tutan reĝolandon kunflagrita, viajn korteganojn ribelitaj, la reĝinon, en la interno, mortintan kaj la malamikojn ekstere vokante vin, postulante vian kapon, por kiu jam estas anoncita premio, kaj, kiu estos lotata morgaŭ aŭ postmorgaŭ kiel loteria bileto. Ĉu tio estas deca, Aleksandro?

La maljunulo kvietigis, klinis la nukon, kvazaŭ iu estis bastonfrapinta lin, kaj murmuris:

— Vi pravas... Vi pravas... Mi ne devas ekscesagi. Mia regno estas en danĝero.

Kaj li pugnobatis al si la kapon, dirante laŭte:

— Kvietigu, Aleksandro! Kvietigu... Atentu pri tiu de Rusujo! Atentu pri la alia, kiu estas en Hago, en kolektiva loĝejo, sieĝita de popolamaso postulanta, ke li eliru — se li tion kuraĝas — Kvietigu, Aleksandro. Kvietigu... Nu, ĉu la reĝino?... Kaj li fiksas la kuraciston per demanda rigardo. Ĉu la reĝino?...

— Ŝi estas tie, en la interno, mortinta...

— Ĝi estis la bolŝevistoj, certe.

— Ne...

— Kiu estis do?

— Mistero.

La delegito, kiu jen rigardis la maljunulon, jen sin turnis al la kuracisto, komprenante nenion pri tiu sceno, vokis la komisararon kaj demandis al li sekrete:

— Diru al mi; ĉi tiu ne estas ŝerco?

— Ŝerco, sinjoro doktoro? Ŝerco en la policejo! Kio tio estas, verdire, mi ne scias. Al mi ŝajnas, ke ni ĉiuj freneziĝas, la kuracisto, vi, mi, la maljunulo, tiu junulino, la policistoj, ĉio, ĉar mi ne komprenas eĉ tiom, kaj montris la longecon de la ungo de la montra fingro, ungo, kiu estis pli malpura ol ujo por balaĵo. La diablo vizitadas ĉi tiun lokon. Tion mi asertas al vi, kaj ĝin alportis tiu junulino, kiu aperis tie ĉi, vestita kiel viro, kaj, kiu malaperis, neniuj scias kiel, nek tra kiu vojo. Vi eĉ ne imagas, kio okazas ĉi tie hodiaŭ. Ĝi estas la ŝtelisto de dolĉaĵoj, la junulino, la bankiero mortinta, la servistino de la bankiero, kiu ankoraŭ estas tie sveninta, kaj fine tiu maljunulo kriegante, minacante... Ĉu mi scias? Se ne estus la honoro de mia ofico, mi estus forkurinta de tie ĉi, tion mi asertas al vi. Rigardu! Rigardu la kuraciston ĉirkaŭbrakante la maljunulon, rigardu! La maljunulon, kiu nomis lin murdinto, kiu kriegis, por ke oni arestu lin, kiu faris la abomenindaĵojn, kiujn ni vidis. Jen li, rigardu. Jen la doktoro ĉirkaŭbrakante lin. Kion signifas tio? Ĉu ĝi estas aŭ ne afero de la diablo?

Efektive la kuracisto estis kondukanta la maljunulon al unu el la fenestroj kun brako sur lia ŝultro, parolante al li amike. Kaj la maljunulo, milda, obeema, kun klinita kapo aŭdis lin sopirante iam kaj iam, pentante pri tio, kion li faris. Tiam la delegito decidita deĉifri la misteron, sin direktis decidema al la kuracisto kaj parolis al li ne plu kiel amiko, sed kiel aŭtoritatulo:

— Sinjoro Doktoro Cardoso, pardonu min sed tio ĉi ne povas daŭri. Tiu maljunulo eniris ĉi tien denoncante krimon kaj akuzis vin kiel murdinton, kaj vi kondukas lin al la fenestro kaj ekparolas kun li, eble por instigi lin kontraŭdiri sin.

— Lobato! — ekkriis la kuracisto, frapante per la piedo la respektindan plankon de la ejo de la Justeco. — Ĉu vi opinias miĉn kapabla atenci la vivon de viro, malgraŭ tio, ke mi estas kuracisto, kaj plie se tiu viro estas mia onklo?!

— Mi ne scias. Tie ĉi estas iu mistero, kaj mi ne permesas misterojn antaŭ la Leĝo.

La maljunulo faris paŝon antaŭen, levis la kapon kaj metante la manon malfermitan sur la bruston, certigis solene:

— Jes, estas iu mistero, jes! Sed mi mobilizos miaj trupojn por diveni ĝin. Mi komandas falangojn, ĉu vi komprenas? Falangoj!

— Sed, fine, kiu estas vi?
— Kiu mi estas?

Li rigardis la delegiton, kvazaŭ li kompatus pro lia nescio, kaj etendante la brakon li indikis la kuraciston, dirante, fiere:

— Demandu al mia ministro...

— Nu! kun milo da diabloj! Diru tuj, kiu estas tiu azeno? kriis la delegito, ne plu povante sin regi.

Kaj la kuracisto, sin klinante, diris ĉi tiujn gravajn vortojn:

— Ĉi tiu azeno, sinjoro delegito, estas neniu alia ol Aleksandro la Granda, reĝo de Macedonio.

COELHO NETO. Tradukis Y.

MIAJ SAUDADOJ

La fama poeto Casimiro de Abreu, iam kantis:

MIAJ OK JAROJ

Ho, kun kiomaj saŭdadoj
Mi pensas pri l' vivaŭroro,
l'infana aĝo el oro
Ha! ĝi ne venos plu!»

Mi parodias:

Min eĉ en miaj OKDEK jaroj;
Vizitas ofte la saŭdadoj
pri oraj revoj, pensoj faroj
pasintaj, kaj pri l'kamaradoj
fidelaj en la pacbatalo
por nia sankta Idealo.

La mort' de l' Majstro, la militoj
Detruis ĝin neniam povas.
Laboru ĉiuj, sen hezitoj,
Por Esperanto, kiu movas
de l'homoj ĉiun noblan koron.
Al Zamenhof ni kantu gloron!

F. V. L.

LEI n. 592, de 29 de Outubro de 1953

Dispõe sôbre denominação de logradouro público.

A Câmara Municipal de Juiz de Fora, decreta e eu sanciono a seguinte lei:


Art. 1.º — Fica o Prefeito Municipal autorizado a dar o nome de Dr. Lazaro Zamenhof a uma das vias públicas da cidade.

Art. 2.º — Revogadas as disposições em contrário, entrará esta lei em vigor na data de sua publicação.

Paço da Prefeitura Municipal de Juiz de Fora, 29 de outubro de 1953.

a.) OLAVO COSTA, Prefeito Municipal.

a.) HERMELINO GATTO, respondendo pelo expediente da Divisão de Administração.



Recenzo

Prof. Rudolf Bölting — UNIVERSAL METHODE ZUR LEKTÜRE GERMANISCHER TEXTE FÜR Esperanto, Português, English, Español, Français. — Eldono de la Aŭtoro, Av. Pres. Vargas, 595, Rio de Janeiro, Brazilo. 137 p. 16,5 x 22 c.m.

La Aŭtoro estas lerta lingvisto tre estimata en kleraj brazilaj rondoj dank'al sia bonega Vortaro Greka-Portugallingva.

En tiu nova libro li donas la plej uzatajn vortojn kaj la plej necesajn gramatikajn regulojn en la lingvoj Esperanta, portugala, angia, hispana kaj franca por la kompreno de germanaj tekstoj. Ĝi estas rimarkinda simpligo de la lernado de la germana lingvo. Eraroj preskaŭ ne estas videblaj; nur unu vundas la okulon, ĉar ĝi estas sur la kovrilo: GERMANISEHER, anstataŭ GERMANISCHER.

Prof. Rudolf Bölting — LA ORIGINALO DE LA NOVA TESTAMENTO. 107 p. 26x21 cm. — Eldono de la Aŭtoro, Av. Pres. Vargas, 595, apt. 603, Rio de Janeiro, Brazilo.


Klera instruisto de la greka lingvo kaj poligloto, la Aŭtoro donas al ni la vortojn kaj gramatikajn regulojn por la legado de la greka originalo de la Nova Testamento, ne kurson de la tuta greka lingvo. La reguloj kaj vortlistoj estas en la lingvoj Esperanta, portugala, angla kaj germana. La reguloj estas klare redaktitaj kaj trafas sian celon komprenigi tuj la nekonatan lingvon.

Kiu lernos tiun kurseton kaj atente studos la Novan Testamenton, jam scios multon el la bela greka lingvo.

D-ro Adolf Halbedl — PAPO PIO X. BEATA — Eldono de A. Paolet — San Vito al Tagliamento (Italujo). 112 p. 19 x 13 cm. Prezo nemontrita. Mendu per B.E.L.

Ĉiu eldonaĵo de A. Paolet estas rekomendinda pro lingva perfekteco, bela aspekto kaj nealta prezo. Tiu ĉi libreto meritas la plej varman aprobon de ĉiu esperantisto pro la graveco de la historia persono de Pio X, kiun eĉ nekatolikoj kun fervoro admiras pro liaj altaj virtoj kaj granda kulturo. La libro havas ankaŭ bonegajn kliŝojn, kiuj igas ĝin pli altira.

Bibliografio



KARL VANSELOW — *Nia Lingvo Esperanto* — Elektita poezio, por deklamo kaj por kanto. Ardesia eldono. Berliner Esperanto-Verlag, Berlino — Ni ricevis la trian kajeron de la unua serio kaj la unuan de la dua serio. Kolekto da poemoj montrantaj la amon al Esperanto de la aŭtoro. Multaj el ili estas verkitaj laŭ konataj germanaj melodioj. Jen unu el ili:

Vespera Koncerto

Kiam najtingaloj trilas,
Ĉiuj ĝoje kunjubilas.
Aŭdu, eĉ la ranoj provas,
Kiel ili kanti povas.

Migremuloj pretervenas.
Kaj la provon partoprenas.
Kia rava serenado:
Trilo, kanto, ran-kvakado.

(Germana popolmelodio)

M. KIDOSAKI — *Zamenhofa Legolibro* — Eldono de Japana Esperanto-Instituto (Tokio) 1953.

Ĉi tiu 106-paĝa broŝuro enhavas bone elektitajn verkaĵojn de D-ro L.L. Zamenhof. Unua parto: tradukaĵoj eltiritaj el Fabeloj de Andersen, Proverbaro, Revizoro,

LIBERIGO DE TIMO KAJ MIZERO — Kompilis: Stillebroer — Tradukis: C. Joon. — Eldono de Internacia Asocio Bellamy, Koningst. 188, Beverwijk, Nederlando. 20 p. 13,5 x 21 cm.

En tiu ĉi broŝuro aperas la celoj de la I.A.B., kiu antaŭ kelkaj jaroj tradukis kaj eldonis en Esperanto la mondfaman verkon de Edward Bellamy — «Rigardante malantaŭen» (tre konata en Brazilo sub la nomo *D'Aqui a cem anos*).

Sendube la plej bela utopia socialisma formo iam aperinta en la mondo estas tiu de Bellamy, kaj ĝi fariĝis idealo socia por homoj tra la tuta mondo, ĉar la bela romano neniam elmodiĝis en ĉiuj lingvoj dum sia longa vivo. La unua eldono aperis en 1887,

kaj estas nun tradukita en ĉiujn lingvojn.

La broŝuro defendas tiujn belajn ideojn kaj meritas atentan tralegon.

Dr. Siegfried Ziegler — **ESPERANTO** — Sprache der Völker — Eine Einführung — Eldono de Verlag Butzon & Bercker — Kevelaer Rhld — 32 p. 10 x 16 cm. broŝ.

La titolo estas: Esperanto — Lingvo de la popoloj — Enkonduko; sed ĝi tamen estas bona gramatiko kun multaj informoj pri la movado kaj la progresoj de nia lingvo, kaj aperas en tre ŝatata kolekto da popularaj libretoj — Berckers kleine Volksbibliothek (Malgranda popolbiblioteko de Berckers) kiel la libreto n-ro 536.

I.G.B.

La Sankta Biblio, Hamleto, Marta. Dua parto: Originalaĵoj el Deveno de Esperanto, Deklaracio, Homaranismo, Estonteco de L.I., Kongresaj Paroladoj, Leteroj, Poemoj.

La kompilo povas servi al ĉiuj esperantistoj, sed precipe al japanaj lernantoj, al kiuj utilas la rimarkoj kaj klarigoj, en japana lingvo.

F. OMELKA — La Alaska Stafeto kaj Kaptitoj de la Glacirokoj. 96 p. bindita. Eldonita de The Esperanto-Publishing Company Ltd. — Anglujo.

Ĉi tiuj rakontoj, originale verkitaj en Esperanto, aperis en la organo de U.E.A. Estis feliĉa ideo fari el ili tiel belan eldonon aparte, donante tiamaniere la okazon al multaj samideanoj legi (aŭ relegi) la du interesajn rakontojn, kiuj nerezisteble ekkaptas la atenton de la leganto de la komenco ĝis la fino.

La eldonisto aldonis biografiajn informojn de la aŭtoro.

Leonard Seppala, unu el la kuraĝaj herooj priskribitaj en La Alaska Stafeto, ankoraŭ vivas.

Anais da Conferência Bidistrital do ano 1951 dos Distritos 119 e 121 do Rotary Internacional. 1 vol. 334 p. kun multaj fotografiaĵoj kaj skemoj 1952.

Tiuj Analoj enhavas la kompletan priskribon de la konferenco de la Distriktoj 119 kaj 121 de Rotary Internacia, okazigita de la 4-a ĝis la 8-a de Aprilo 1951, en Serra Negra, ŝtato São Paulo.

Nia samideano Alcindo Brito, eminenta rotariano, partoprenis plurfoje la paroladojn kaj debatojn, rekomendante la lernadon kaj uzon de Esperanto por la internacia rilatoj.

Esperanto, lingua internacional — Propaganda broŝuro de Kuba Esperanto-Aso-

cio (Apartado 1324, Habana, Cuba). Bonege verkita propagandilo, klarigante la problemon pri internacia lingvo kaj ĝia solvo, kun interesaj citaĵoj de Descartes, Maupertuis, American Philosophical Society.

Nova movado marŝas — Leginda broŝuro pri Celo kaj vojo de la Sansportmovado. Svenska Frisksportförbundet, Internacia Komitato — Karlbergsvägen 14, Stokholmo, Svedujo.

PRÓ OU CONTRA ?

O excelente matutino "Diário de Notícias", desta Capital, em sua edição dominical traz uma página de *Secção Feminina*, cuja primeira coluna é intitulada *Pró ou Contra?* Em cada domingo esta interessante secção insere respostas dadas por leitores de ambos os sexos a determinadas questões. Entre muitas outras citemos algumas: *Pró ou contra* as novelas de rádio (resultado: de 10 pessoas ouvidas, 9 contra e 1 indiferente), a mulher na política, na carreira diplomática, o divórcio, a pena de morte no Brasil, a mudança da Capital da República, etc.

Abaixo transcrevemos o que, na edição de 23 de Agosto trouxe a Secção:

"Pró ou Contra o ensino do Esperanto nas Escolas?"

Nosso leitor, Sr. Haroldo Silva, residente à rua Marechal Joaquim Inácio, 40, casa 6, em Realengo, dirigiu-nos uma carta da qual transcrevemos o seguinte trecho: "Tenho lido com atenção essa coluna desse grande matutino, intitulada PRÓ OU CONTRA. Parece-me de grande alcance, porque, de algum modo, reflete a opinião pública. E' por isso que venho, por meio desta, sugerir a questão da inclusão do Esperanto nas escolas e o seu emprego nas relações internacionais". Nossa pergunta de hoje, atendendo à sugestão do

Sr. Haroldo Silva, é, portanto, sôbre o ensino do esperanto nas escolas.

Sabe-se que o esperanto, linguagem inventada por Zamenhof, é destinada a favorecer o internacionalismo, uma língua que falada por todos os homens iria facilitar o entendimento entre os povos de idiomas mais diversos.

Vejamos como respondem nossos leitores:

AS MULHERES:

ADELAIDE M. CASTRO — professora: — *Pró.* O Esperanto é um sonho como outro qualquer; não creio que ele venha tornar os homens mais compreensíveis entre si, mas em todo caso é uma tentativa e não se deve fugir nem das tentativas em benefício dos povos, nem da conquista de cultura.

MEMEM — ceramista francesa: — *Contra.* O Amor é a única linguagem internacional.

RUTE SANTOS E SILVA — mãe de família: — *Contra.* Não creio no Esperanto como linguagem para todos os povos, como não creio na paz mundial.

MARIA LÚCIA — estudante: — *Pró,* mas sem muita convicção. Sou pró porque nunca sou contra as experiências, mas como já disse não acredito muito em linguagem universal.

OSCARINA NUNES — dona de casa: — *Confesso que até hoje nunca pude compreender bem o que é Esperanto. Em todo caso, voto a favor.*

RESPONDEM OS HOMENS:

RAIMUNDO NOGUEIRA — desenhista: — *Pró se o ensino do Esperanto for obrigatório em todos os países do mundo. Assim o Esperanto se tornaria o que pretende ser: linguagem universal.*

PEDRO LUIS MASI — poeta: — *Pró,* porque só será útil. Após a adopção da medida em diversos países, e, possivelmente, tornando-a língua obrigatória para as reuniões ou comunicações internacionais, tais como a Assembléia da ONU e

também na União Postal Universal, para facilitar os Correios e Telégrafos, em substituição do francês, ainda vigorante.

D'ÁVILA — pintor: — *Pró.* Como subsídio à cultura é muito interessante, mas os homens não se entenderão jamais.

GENTIL NORONHA — jornalista: — *Quando o actual regime económico social desaparecer, os homens e as mulheres se compreenderão até mesmo em silêncio.*

HOMERO HOMEM — escritor: — *Contra.* Nosso "currículum" já está muito sobrecarregado. E' preciso descentralizá-lo, simplificá-lo. Por outro lado, não acredito que o Esperanto contribua, em parcela apreciável, para a aproximação entre os povos. De qualquer maneira, aprender esperanto é tão gostoso quanto coleccionar selos.

RESULTADO: — *Entre as dez pessoas ouvidas pró ou contra o ensino do Esperanto nas escolas, cinco votaram a favor, três contra e dois nem pró nem contra.*

Agradecemos a nosso leitor Haroldo Silva, a colaboração e gostaríamos de ouvir sua resposta à pergunta por ele sugerida".

E no número de 6 de Setembro o "Diário" publicou a resposta solicitada:

Recebemos de nosso leitor Haroldo Silva, funcionário autárquico, carta datada de 23 de Agosto último, em que declara:

"Sôbre o ensino do Esperanto nas escolas, dou-lhe a minha resposta, seguida das razões: Sou a favor. A utilidade do Esperanto está comprovada pelas inúmeras obras e periódicos publicados e pelos 38 congressos internacionais realizados. Tendo passado da fase experimental, há muito deixou de ser um simples sonho ou passatempo. O Esperanto não poderá, porém, modificar os sentimentos humanos, pois foi criado apenas para servir de idioma neutro nas relações entre povos que falam diferentes línguas.

Agradecer-lhe-ia, Sr. Redactor, que publicasse estas palavras acima, pois talvez esclarecessem algumas dúvidas que ainda existem em relação ao Esperanto".